



Proklamis Kubo sian novan konstitucion



La 10-an de aprilo, Kubo proklamis la novan Konstitucion konfirmitan per referendumo la pasintan 24-an de februaro. Tiamaniere, oni oma?is la gloran tagon okazintan de anta? 150 jaroj, kiam oni aprobis la unuan Konstitucion de la respubliko en armiloj en la Asembleo de Guáimaro.

La festparolado estis farita de Raúl Castro, unua sekretario de la komunista partio, kiu esprimis ke la nova Konstitucio garantias la kontinuecon de la Revolucio kaj la socialismon en nia lando, kaj ?i sintezas la aspirojn de ?iuj kiuj la?longe de 150 jaroj bataladis por ke Kubo estu libera, sendependa kaj suverena.

Li klarigis ke tiu ?i le?o estas filo de sia tempo. Respegulas historiajn cirkonstancojn de la konstruado de nia socio kaj ?i gvidas jure la transformojn okazintajn kun vizio de estonteco, kies supera celo estas atingi socialismon ?iam pli prosperan, da?ripovan, inkluzivan kaj partoprenan.

Inter la tujaj takoj entreprenendaj, Raúl elstarigis la aprobon de nova Elekta Le?o, kies anta?projekto estas nun ellaborata kun la celo prezenti ?in al la nacia parlamento en ties venonta ordinara sesio, meze de la jaro.

Post ekfunkciigo de la nova Elekta Le?o, la parlamento elektos la nacian elektan komisionon, kaj la? la transira artikolo de la konstitucio, anta? ol tri monatoj postaj, la asembleo elektos sian prezidanton, vicprezidanton kaj sekretariojn, kaj la ceterajn membrojn de la ?tata konsilantaro,



kaj sekve la prezidenton de la respubliko kaj la vicprezidenton.

Li detaligis la sekvajn paŝojn, tiel ke komence de 2020 oni elektos la guberniestrojn kaj vicguberniestrojn provincajn, kaj sekve, la distriktaj asembleoj nomunos siajn intendantojn.

Raúl emfazis ke oni laboras por ke ĉiuj agadoj konkretiĝu antaŭ fino de la nuna jaro.

Temis pri simbola tago kaj ankaŭ de kontinueco, ĉar, per la pozitiva voĉdono de sep milionoj da elektantoj, Kubo donis al si mem, Konstitucion pli modernan, funkcipovan kaj revolucion, diskutitan en vasta popola konsultiĝo, kiel aŭtoktona kaj escepta demonstrado en la plenumo de la popola povo, kaj sekve, de la partoprena kaj demokratia karaktero de la insula politika sistemo.

Okazis historia ceremonio kun la spirito de la patriotoj de 1869 en la Kongresa Palaco de Havano, kie per solena kaj eksterordinara sesio de la nacia parlamento, oni proklamis la novan Konstitucion.